

**1(163)
2017**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Józef Baran

Skok ostateczny

umieranie to tylko spadanie
z mont blanc ciała

skok o WSZYSTKO
w zachłanną nicość

z wiarą że po
przekroczeniu bariery istnienia

otworzy się sam
spadochron duszy

Julia Hartwig

Z notatnika

Julia uśmiecha się do mnie
jak do pięknego wspomnienia
pisze w pozostawionym notatniku

Luźne zapiski mówiące
o ostatecznym pożegnaniu

Śmierć zaczyna się w chwili
kiedy zaczynasz nie podobać się
samemu sobie
I zaczyna się odpływ sił

Energia kierowana na zewnątrz
uderza teraz w ciebie
i zabija

La salto definitiva

la mortado estas nur falado
el *mont blanc* de la korpo

la salto je ĈIO
en avidan neniecon

kun fido ke post
trans paso de est-bariero

malfermiĝos mem
la para suto de la animo

El la notlibro


Julia ridetas al mi
kiel al la bela rememoro
ŝi skribas en la lasita notlibro

Lozajn metaĵojn parolantajn
pri la definitiva adiaŭo

La morto komenciĝas en momento
kiam vi komencas ne plaĉi
al si mem
Kaj komenciĝas fornaĝo de la forto

Energio direktata eksteren
batas nun en vin
kaj mortigas

tradukis Lidia Ligęza



Forpasis neforgesebla amiko kaj eminenta artisto

La kvinan de julio de la jaro 2017 forpasis nia kara amiko Andreo Kolpanowicz, eminenta pentro-artisto kaj grafikisto, bonega esperantisto. Oni sciis, ke de ia tempo li aŭ malbone fartas aŭ malsanas, sed neniu supozis, ke tio tiel rapide alkondukos al la neevitebla finalo.

La dekunan de julio la entombiga solenaĵo sur krakova tombejo en Batowice arigis krom la familio multajn ĉeestantojn, inter kiuj la forpasingo vivis kaj agis, ankaŭ multnombrajn grupojn de geesperantistoj. Ĉiu el inter ni kun la bedaŭro devis pensi pri diversaj aspektoj de lia vivo, foriris ja homo elstara kaj nestereotipa.

Andreo Kolpanowicz naskiĝis en la jaro 1938, en Krakovo. Lia familio devenas el Orienta Pola Ĉelimejo. Post la januara ribelo en 1863 j. ĝi translokiĝis al Galicio. Post la dua mondmilito la familio ekloĝis en Tenczynek, kie la patrino de

Andreo Janina ricevis instruistinan postenon kaj ofican loĝejon. Lia patro Jan estis orgenomajstro, produktis ankaŭ harmoniumojn.

La familia nomo Kolpanowicz devenas de la litova vorto *kolp* - cigno. La vorta parenceco kun tiu bela kaj nobla birdo tre al Andreo plaĉis.

De la infanaĝo la junulo ŝatis desegni, do lia vivovojo de la komenco estis difinita. Li en la jaro 1967 diplomiĝis en Pentroarta Fakultato de la Belarta Akademio en Krakovo. Lia gvida majstro estis agnoskita artisto, profesoro Jerzy Nowosielski, kun kiu la disĉiplo tamen ne sentis pli fortan ligon konfesante: "Mi devis ja ĉe iu studi". Similan indiferenton prezentis Andreo ankaŭ rilate al aliaj lekciantoj, aŭskultante nur atente kaj plaĉe rimarkojn "kiel estas malpermesite pentri". Li eĉ opiniis sin aŭtodidakto.

Kaj kiel studento kaj dum la tuta arta agado Andreo paŝis laŭ la individua vojo kaj realigadis proprajn gustojn. Li pentris alproksimiĝante pro perfekteco de la formo al la malnovaj majstroj kaj pro maniero fiksi realisme aspektantajn personojn kaj aĵojn en malprobabla ĉirkaŭmedio – al superrea-lismo. Liaj komponaĵoj pentrataj malrapide, post la matura pripensado – pejzaĝoj, simbolismaj bildoj kaj portretoj prezentas ĉiam honestan, perfektan stablon kaj penson de la ĝisfunde originala artisto.

Andreo Kolpanowicz estis artisto tre modesta, neniam avida bruon de amaskomunikiloj, evitanta intervjuojn kaj kaŭzitan de ili famon. Malgraŭ tio li forte influis al pentristoj, kiuj emis realigi sin laŭ fantazia realismo.

Unu el rakontoj de Jorge Luis Borges prezentas Universon kiel grandan Bibliotekon. Ciklo "Biblioteko" de Andreo Kolpanowicz estas plena de pligrandigitaj, malnovaj foliantoj pentritaj majstre kaj ilustrantaj diversajn aspektojn de homa ekzisto. Ĉi metafizika, plena de superrealisma fantazio, devenanta de la sonĝoj pentroarto plaĉis en la lando kaj ekster ĝi. Atestas pri tio multaj gravaj ekspozicioj, en kiuj Andreo partoprenis mem aŭ kun aliaj artistoj: Krakovo (Desa 1977, Galeria N° 4, 1996, Kocioł Artystyczny 1987), Lublino (Metafora 1987, 1988, TPSP 1990), Amsterdamo (Hüsteppe 1973), Kolonio (Agentus Ost-Art 1990, Inter Art Galerie Reich 1997), Vupertalo (Poly-Print 1998), Berlino Okcidenta 1970, Stutgarto 1972, Geteborgo 1972, Malmö 1972, Bruselo 1974, Hamburgo 1979, Kilonio 1979, Kuvajto 1987, Kairo 1988, Płock 2009.

Krom la olea pentroarto Andreo okupiĝis, ofte pro petoj de amikoj, pri kovriloj de libroj. Serio de libroj eldonitaj de krakova Kunfrataro de Poetoj (Konfraternia Poetów) estas ornamita

per koloraj reproduktaĵoj de liaj bildoj. Libro de Wendy Heller "Lidia. Vivo de Lidia Zamenhof" (Bydgoszcz 2009, trad. L. Ligeża) logas per bela, nobla portreto de la majstro-filino farita de Andreo laŭ unu el ŝiaj fotoj. Ĉiun numeron de kvaronjara magazino "Spegulo" (red. Tomasz Chmielik, 2008-2010) ornamas liaj subtilaj grafikaĵoj.

Andreo estas ankaŭ aŭtoro de korespondaj poŝtkartoj. Serion de ili dediĉitan al Krakovaj Esperantaj Tagoj dum kelkaj jaroj distribuis la Pola Poŝto. Krakova Societo Esperanto ŝuldas al li glumarkojn okaze de Esperantaj Tagoj de Krakovo kaj Tutpollanda Kongreso de Esperanto en 2000. Plaĉis projektitaj de li porokazaj insignoj por alpingli kaj emblemo de KSE uzata ĝis nun.

Krom pentroarto, literaturo kaj kulturo Andreo Kołpanowicz interesiĝis pri la internacia lingvo Esperanto. Envere li memironie diris: "Mi sciis, ke mi kiel oldulo frenezigiĝos, sed mi ne pensis, ke tio estos Esperanto", tamen lia esperanta agado estis serioza kaj fruktodona. En Krakovo li kompetente instruis la lingvon kaj kiel vicprezidanto de Krakova Societo Esperanto partoprenis en multaj ĝiaj aranĝoj lekciante kaj okupiĝante pri organizaj aferoj. En jaroj 2008-2010 li estis ĉefredaktoro de la krakova revueto de KSE "Apudvistula Bulteno", en kiu aperadis liaj desegnaĵoj. Ĝia aldono pri aferoj el Krzeszowice nomiĝis "Najbara Folio".

Li fondis kaj gvidis Esperantan Rondon en Krzeszowice (ekde 13. 02. 1998), filion de KSE, kies geanoj renkontiĝadis ĉiun vendredon. Andreo inspiris medion en Krzeszowice fondi koruson "Najbarinoj" sud gvido de Maria Rybacka. La sinjorinoj kantis ĉe piana akompano de la gvidantino en la propra urbo kaj en Krakovo, ĉefe en teatro "Arena" de Jadwiga Gibczyńska. Spektaklo apogita je tekstoj de esperanta poeto el Cieszyn Kazimierz Szczurek tre plaĉis al esperantistaro kaj spektaklo, kiu vorte kaj muzike realigis poemojn de Julian Tuwim elvokis veran raviĝon.

Neforgeseblaj por lokaj, krakovaj kaj ne rare eksterlandaj esperantistoj restos ĉarmaj, societaj renkontoj en Krzeszowice, sur parcelo de Barbara kaj Stanisław Sułkowski, dum kiuj memkompreneble oni povis ĝui pro ĉeesto de Andreo. Ni drinketis, manĝis, kantis kaj antaŭ ĉio havis okazon interese kaj inteligente interparoli.

Andreo Kołpanowicz kun grupo de esperantistoj partoprenadis en ĉiujaraj Baltaj Esperantaj Tagoj – en Litovio (Veisiejai, Kovno), en Latvio (Lipavo), en Estonio (Talino) kaj en Rusio (Kaliningrado). La grupo estis ankaŭ en Jalto (Krimeo) kaj kelkfoje en Ĉeĥio.

Oni diras, ke ne ekzistas homoj neanstataŭeblaj. Evidenta nevero. Andreon povas anstataŭi neniuj, almenaŭ por mi. Jam neniam mi ekaŭdos en telefono lian voĉon, ĉiam ĝentile demandantan: "Ĉu vi vere nun povas dediĉi kelkajn momentojn, por kun mi interparoli?" Jam neniam mi ekvidos dum promeno aŭ en kafejo lian ridetantan vizaĝon, ne ekaŭdos liajn leĝere mokajn kaj malicajn, spritajn komentariojn pri personoj kaj eventoj.

Mi estas vere feliĉa, ĉar mi posedas tri bildojn de la majstro. Unu estas olea, brunkolora, kiel ĉe malnovaj pentroartistoj, superrealisma komponaĵo prezentanta realisme pentritajn objektojn, kiuj neniam povis troviĝi kune. Dua estas mia olea portreto plena de verdo kaj koloroj de aŭtuno kun malnova libro kaj folio, surfone de montoj kaj violkolora ĉielo. Ĉi verkon alte pritaksis la ekspertoj kaj al ĝi la aŭtoro faris tian rimarkon: "Konante viajn plaĉojn mi devis pentri por vi montojn. Se mi ne ŝatas Tatroj, ili estas tro agresivaj, do mi pentris por vi la Malaltan Beskidon!" Finfine mia tria bildo de Andreo: akvarelo, verŝajne pejzaĝo el ĉirkaŭaĵo de Krzeszowice – ĝue strikta, sur kiu oni povas diferencigi ĉiun herbeton kaj ĉiun folieton. Al kelkaj miaj gekonatoj Andreo ankaŭ faris interesajn portretojn, belkolorajn kaj ĉiam nebanale pripensitajn. Jadwiga Dzięgielewska prenis duone aspekton de violonĉelo. Klasika gitaro de majstro Jan Oberbek fajras kiel flamo kaj kiel devas fajri la ilo de vera artisto. Sur portreto de Jadwiga Czarnecka ŝiaj penetremaj okuloj brilas el ekster okulvitroj montrante ŝian scivoleman naturon.

Andreo povis esti vere fiero de sia verko kaj ĝoji pri ĝi. Li havas triopon de artiste kapablaj infanoj: filon Martenon – artpentriston, filon Joakimon – muzikiston kaj kapelestron kaj filinon Julia-n – violonistinon.

Ni adiaŭas vin, Andreo, plenaj de la plej bonaj sentoj kaj dankemo, ĉar vi esence pliriĉigis vivon de ĉiu el inter ni.

Lidia Ligeża

Rememoro pri Andreo

Estingis la flamo de la vivo de granda homo, eminenta samideano kaj elstara artisto-pentristo, nia amiko Andrzej (Andreo) Kołpanowicz. Kiam mi vizitis Andreon je lasta fojo en Lia ateliero komence de ĉi-majo, Li estis pentrinta siajn novajn bildojn kaj interese rakontis tiam pri ili kaj pri lingvoj. Estis granda plezuro por mi interparoli kun Andreo pri pentrarto, skulptarto, arkitekturo kaj kulturoj. Hodiaŭ 11-an de julio je la lasta fojo ni adiaŭis Andreon kune kun kelkdeko da esperantistoj, Lia familio kaj amikoj en tombejo de Kraków-Batowice. Dum la entombigo eĉ ĉielo ploris pro forpaso de nia kara samideano.

Andrzej Kołpanowicz naskiĝis la 1-an de februaro de 1938, en Krakovo kaj mortis la 5-an de julio de 2017 en sia naskiĝurbo. Li studis en la krakova Akademio de Belartoj kaj diplomiĝis en 1967 en la Fakultato pri Pentrarto ĉe prof. Jerzy Nowosielski. Li praktikis la stablan pentradon verkante ĉefe oleopentraĵojn en metafora-superrealisma stilo, kaj ankaŭ portretojn, mutajn naturojn, kaj verismajn pejzaĝojn uzante i.a. akvarelo-teknikon. Liaj verkoj estis prezentitaj dum multaj naciaj kaj eksterlandaj ekspozicioj. Liaj bildoj estas eksterordinaraj kaj adorataj de diverslandanoj, tamen Li preferis resti silenta kaj labori trankvile. Oni povas rigardi kelkajn el Liaj verkoj ĉe jena retpaĝo: www.andrzej.kolpanowicz.art.pl

Elstara estas Lia kontribuo al Esperanto-movado. Dum multaj jaroj Andreo kontribuis al Esperantaj Tagoj de Krakovo per siaj kunlaborado, prelegoj kaj atelieroj. Liaj gefiloj ankaŭ partoprenis en ĉi aranĝoj kiel plenumantoj de koncertoj. Li kunorganizis amikajn renkontoj de samideanoj en apudkrakova Krzeszowice. Ĉiam volonte kaj multfoje Li renkontiĝis kun samideanoj vizitantaj Krakovon kaj gvidis ilin interese rakontante pri tiu reĝa urbo. Jen kelkaj prifotitaj renkontoj kaj aliaj eventoj, kiujn Andreo lastatempe partoprenis: www.kse.cba.pl/renkontoj/ Li sukcese ekinteresis sian artistan familion pri la internacia lingvo danke al kio filoj kaj nepo fariĝis samideanoj.

Krom pentrado Andreo verkis tekstojn pri arto, sia regiono, vojaĝoj kaj aliaj aferoj. Li kunlaboris pri eldonado de "Apudvistula Bulteno" www.kse.cba.pl/bulteno.htm de Krakova Societo ESPERANTO kaj "Najbara Folio" www.kse.cba.pl/kunlaboro.htm de Rondo de Esperantistoj en Krzeszowice. Li multon legis kaj estis erudito. Montrante al mi sian bibliotekon, plenplenan da libroj kaj revuoj, etendiĝantan al kelkaj ĉambroj, Li ŝercis, demandante kun zorgo en la voĉo: "Kion poste faros kun ĉio tio edzino de abonanto?"

Andreo ankaŭ multon helpis ĝisdatigante retejon de KSE kaj instigis aliajn kunlabori.

Pollingve pri Andreo Kołpanowicz kaj Lia verko oni povas legi elektronike:

<http://www.andrzej.kolpanowicz.art.pl/biografia.php?lg=pl>,

<http://przelom.pl/andrzej-kolpanowicz/>

Omaĝe al Andreo kaj aliaj forpasintaj artistoj oni planas estigi artan eventon "Zaduszki".

Estis por mi vera feliĉo ekkonatiĝi kaj kunlabori kun Li.

Adam Wilkus